

INDICE

- I nostri prossimi giovedì
- Il dott. Polerani membro onorario della FEI
- Nel C.E.M. tre nuovi membri onorari!
- 85^a Itala kongreso de Esperanto
- 103^o Congresso Universale a Lisbona
- 74^a Internacia Junulara Kongreso
- Ekumena Kongreso en Poděbrady
- Estrarkunsido
- Niaj pasintaj ĵaŭdoj
- Notizie dal mondo

Circolo Esperantista Milanese

Via De Predis 9 - 20155 Milano - tel. 3474262214

e-mail: esperantomilano@yahoo.com

rete: <http://milano.esperantoitalia.it/>

C.C.P. 26448209

IBAN: IT36 J076 0101 6000 0002 6448 209

I NOSTRI PROSSIMI GIOVEDÌ

ore 21,15

aperti a tutti gli interessati: soci e non soci

Giovedì 13 settembre

Si riapre la sede con la bimestrale e sempre aperta a tutti

RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO

Giovedì 20 settembre

Dopo il tradizionale e gaio incontro in pizzeria (alle ore 19.30 da "Ciccibello" - Via degli Ailanti n° 3. Prenotarsi in sede o presso Rodari, Tel. 02- 2364190) il programma in sede prevede, a cura di alcuni associati, i rapporti su

I CONGRESSI ESTIVI ESPERANTISTI

Giovedì 27 settembre

LA TRADUKA RONDO

Giovedì 4 ottobre

TRAFOLIUMANTE LA ESPERANTAN GAZETARON

Giovedì 11 ottobre

KONVERSACIA RONDO

Giovedì 18 ottobre

Il conviviale incontro in pizzeria (h.19.30 da "Il Faraone" - Via Masolino da Panicale 13. Prenotarsi in sede o presso Rodari, Tel. 02- 2364190) sarà il prologo ad un interessante programma curato dal nostro presidente dott. Aldo Foà dal titolo

RIFLESSIONI SULL'AFRICA

arricchito dalla proiezioni di fotografie sul tema.

Giovedì 25 ottobre

LA TRADUKA RONDO

Giovedì 1 novembre

SEDE CHIUSA PER FESTIVITA

Giovedì 8 novembre

RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO

Giovedì 15 novembre

Il programma in sede è ancora da definire, con preludio in pizzeria

GLI "INCONTRI DI CONVERSAZIONE" del mercoledì in sede riprendono il 12 settembre regolarmente dalle ore 17 alle ore 19.

IL DOTT. POLERANI MEMBRO ONORARIO DELLA FEI

In occasione del Congresso Italiano a San Marino, è stato annunciato che il Consiglio Nazionale della Federazione Esperantista Italiana ha deciso all'unanimità di nominare il nostro dott. Gianfranco Polerani Membro Onorario della FEI con la seguente motivazione:

"Dum jardekoj prezidanto de CEM (Grupo de Milano), membro de la Konsilantaro de FEI, kasisto kaj poste kontorevizoro. Li ĉiam certigis saĝan financan administradon de FEI. Membro de la UEA-Komitato kaj kontorevizoro de UEA."

Un giusto riconoscimento ad una persona che durante decenni si è sempre e generosamente impegnata a favore del movimento e dei suoi ideali. Gli amici del Circolo Esperantista Milanese, orgogliosi di averlo come associato e da trent'anni loro presidente, ora onorario, si stringono attorno a lui con compiacimento e con un sincero grazie.

NEL C.E.M. TRE NUOVI MEMBRI ONORARI!

Un record che inorgoglisce tutto il Circolo: avere fra noi ben tre dei membri onorari della FEI: il dott. Polerani, il dott. Nicola Minnaja, ben noto nel suo campo professionale e al vertice del movimento esperantista (per alcuni anni responsabile culturale dei congressi) e l'ing. Ranieri Clerici, sempre generosamente sulla breccia e con infaticabile tenacia promotore di molte iniziative (anche l'UEA al congresso di Lisbona gli ha conferito un diploma di merito "pro la elstara agado en UEA - iama estrarano kaj vicprezidanto, iama

delegito de UEA en Ĝenevo ĉe UN -kaj en Italio, inter alie pro la prizorgo dum multaj jaroj de la rilatoj de I.E.F-ederacio kun RAI”). Gli altri due sono i ben noti veterani dott. Paolo Bonomi, giudice di pace veronese, e la prof.ssa Lea Fabbri, che a Bolzano tiene ancora dei corsi! A tutti le congratulazioni del CEM ed un sincero ringraziamento.

85ª ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

Mi partoprenis en la 85a Itala Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazis de la 18a ĝis la 25a de aŭgusto en San Marino (do, fakte eksterlande).

La kongresa programo estis riĉa je multaj eventoj, ekskursoj kaj diversaj aktivajoj, jam eke de la unua tago, kiam estis la speciala poŝta stampo ĉe la Filatela Oficejo, la katolika meso en la Preĝejo San Francesco, la inaŭguro en la kongreseja enirejo de la ekspozicio dediĉita al la grava sanmarina esperantistino Marina Michelotti kaj vespere la spektaklo kiu enhavis kaj la dancojn kaj la prezentadon de la dumsemajnaj ekskursoj.

Dimanĉon matene okazis la oficiala malfermo de la Kongreso, kun la salutoj de lokaj aŭtoritatoj, de la LKK, de la reprezentantoj de multaj Esperantaj asocioj (ILEI, IFEF, UECL, ktp), de esperantistoj venintaj el la kvin kontinentoj; sekvis la disdonado de la premioj de la traduka konkurso kaj la prezentado de la kursoj organizitaj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (kies sidejo estas en San Marino). Ene de la malferma ceremonio estis ankaŭ la parolado de Javier Alcalde pri la kongresa temo “San Marino kaj Esperanto: malgrandaj komunumoj kaj grandaj valoroj”.

La lunda, marda, ĵaŭda kaj vendreda matenoj estis dediĉitaj al la Seminario de Javier Alcalde, al la kursoj Baza, Progresanta kaj Konversacia de Esperanto kaj al la AIS-kursoj, kiuj estis kvar: pri “Ĝenerala Lingvistiko” (prof. D. Astori), pri “Astrobiologio: la eblecoj por vivo ekstertera” (prof. Amri Wandel), pri “Shakespeare sojle de nova jarcento: Hamleto kaj poste” (prof. H. Tonkin) kaj pri “Bioenergetiko de la homa organismo” (prof. Eva Boyadjeva). Gravaj kutimaj programoj estis la jarkunsidoj de Itala Esperanto-Federacio, de la italaj sekcioj de ILEI kaj de la Itala Instituto de

Esperanto. Komence de la jarkunsido de IEF oni disdonis diversajn premiojn: premio Trombetta (por meritoplena instruisto) al Giorgio Denti el Romo, premio Conterno al la Esperanto-klubo de Treviso, diplomoj al elstaraj esperantistoj, (inter kiuj nia honora prezidanto Gianfranco Polerani), kiuj iĝis honoraj membroj de la Federacio. Poste oni pridiskutis kaj voĉdonis la moralan raporton kaj la financon situacion de la asocio. Oni ankaŭ decidis ne ŝanĝi la jaran aliĝkotizon al Federacio, oni prezentis la eventojn programitajn por la lastaj monatoj de ĉi tiu jaro kaj oni preparolis eblan partoprenon en la “Marcia della pace” el Perugia ĝis Assisi. Multaj estis la tre interesaj prelegoj kaj prezentadoj dum la tuta semajno; inter ili, mi menciis tiun de Ivan Orsini pri “Aliaj planlingvoj kaj iliaj grandaj valoroj”, “Enigmoj en Esperanto”n fare de Luca Desiata kaj Giorgio Denti (tiu aktivaĵo ankaŭ inkluzivis krucvortenigman konkurson) kaj la prezentadon, zorgatan de Elda Doerfler, de la venontjara Itala Kongreso en Trieste.

Tre ŝatataj de la kongresanoj estis la ekskursoj, kaj en San Marino kaj en la ĉirkaŭajaj urboj: Ravenna, Cesena kaj Cervia, Urbino kaj Gradara, Faenza, Rimini, San Leo, Santarcangelo di Romagna. Mi ne ĉeestis en iu el ili preferante plibonigi la konon de San Marino, profitante je la eblo viziti 5 ĉefajn muzeojn kontraŭ nur 7,50€. La vesperaj programoj estis vere riĉaj kaj interesigaj: krom la jam konataj orientaj dancoj fare de Paola Tosato, estis koncertoj (en Parko en la supera parto de la urbo) de Jomo, de Grazia Barboni (kantoj de De Andrè en Esperanto) kaj de Chiara Raggi (kantistino neesperantista kiu tamen bonege sukcesis kanti en nia internacia lingvo); ĵaudon kaj vendredon la vesperaj programoj estis en iu salono de la Grand Hotel: la teatra spektaklo “Unua Rigardo” de Mario Migliucci, poste legado de poemoj kun muzika akompano, zorgata de “Duopo Evocarè”. Speciala vespero estis tiu de merkredo, kiam en la ĝardenoj de la Itala Ambassadejo gastigis la klasikmuzikan koncerton de la fluta kvaropo “Renaissance”; ĉeestis la itala ambasadoro kune kun liaj kunlaborantoj, kiuj tre ĝentile organizis la eventon kaj ankaŭ regalis ĉiujn per bufedo.

Dum la kongreso ankaŭ estis faritaj ekzamenoj: tiuj unua- kaj duagrada de la IIE kaj tiu KER (kun kvar kandidatoj, inter kiuj mi).

Mi multe ĝuis la junularan programon, kiu sekvis la kongresajn vesperojn kaj estis bone organizata de Carlotta Pavese: ne nur la plej junaj kongresanoj ŝatis la Trinka-manĝan nokton (dum kiu multaj homoj portis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el siaj landoj kaj ebligis la aliajn ilin gustumi), la noktan promenadon tra la urba centro, la vin-gustumadon kaj aliaj aĵojn en diversaj lokaj trinkejoj. Vendredon posttagmeze estis la resumo de la laboroj de seminario kaj de la AIS-kursoj, la premiado de la fota konkurso (du niaj klubanoj gajnis la du premiojn: Cristina Bollini ricevis la ĉefan premion kaj Riccardo Lamperti honoran mencion) kaj fine la oficiala fermo de la kongreso.

Francesco Fagnani

103° CONGRESSO UNIVERSALE A LISBONA

Con le ultime giornate infuocate da un clima torrido, si è concluso con successo a Lisbona il 103° Congresso Universale dell'UEA, svoltosi dal 28 luglio al 4 agosto. Ad esso hanno aderito quasi 1600 esperantisti da tutti i cinque continenti e la maggioranza di essi ha partecipato con regolarità ai molti e variegati programmi previsti e svoltisi nelle 11 sedi ufficiali (saloni e sale) oltre ad altre secondo necessità. Grazie al frequente interessamento della stampa locale l'avvenimento ha suscitato un buon riscontro. Il sindaco Fernando Medina ha provveduto a dare il benvenuto ufficiale della città mentre L'UNESCO ha invece inviato un messaggio di augurio e di sostegno della sua Direttrice Generale Audrey Azoulay ribadendo il comune impegno nel favorire la diffusione dell'esperanto, un valido strumento per favorire la comunicazione e la comprensione fra popoli e difendere il plurilinguismo e quindi le diverse culture. La prolusione ufficiale inaugurale è stata tenuta dal presidente dell'UEA Mark Fettes, che si è agganciato ai gloriosi navigatori portoghesi (Vasco de Gama e Magellano) come a dei precursori che hanno notevolmente ampliato e favorito la comunicazione nel mondo, uno dei compiti che l'Esperanto si prefigge e porta avanti. Ma non dobbiamo solo portarlo come messaggio: dobbiamo anche praticarlo con l'uso quotidiano per meglio diffonderlo ed ancor più

7fare cultura per dimostrare la sua validità. Ora c'è la Rete, uno strumento di importanza fondamentale. Da Wikipedia, che dobbiamo sempre arricchire e mantenere all'avanguardia, ad altre possibilità offerte, come ad esempio Duolingo. Circa 1,7 milioni sono stati finora i visitatori che si sono interessati di Esperanto su Duolingo: certamente in gran parte per semplice curiosità, ma se anche una bassissima percentuale di essi desse un seguito avremmo trovato una fonte di nuovi esperantisti. Dobbiamo quindi studiare occasioni di collaborazione. Per il dott. Fettes è pure importante il senso di appartenenza per rafforzare noi stessi e la nostra immagine verso l'esterno e ovviamente uno dei modi migliori è aderire all'UEA come membro individuale effettivo. Molto complesso ed articolato il tema ufficiale del Congresso, condotto dal prof. Ulric Lins in quattro sessioni legate al rapporto degli esperantisti con i diversi tempi. Ora il tema è la loro posizione a fronte della globalizzazione e delle moderne colonizzazioni. Ma la prima fu quella che essi ebbero durante la prima Guerra Mondiale. La seconda sessione invece riguardava la loro situazione nel periodo fra le due guerre mondiali dominato da dittature e nazionalismi. La quarta sessione infine si è dedicata ai più recenti fenomeni che ora ci toccano: i migranti ed i rifugiati. Molti i programmi culturali e ricreativi, oltre alle riunioni istituzionali, i corsi, gli esami K.E.R. tenuti dall'infaticabile Katalin Kovats, le gite, il parallelo "Infana Kongreseto", i concerti serali, ecc. Una citazione particolare ai circa 20 IKU (le conferenze a livello universitario), due delle quali tenute dall'ing. Maurelli insieme al collega Zangh, e alla serie di incontri di circa mezz'ora con noti autori (tra di essi i prof. H. Tonkin, Carlo Minnaja, Anna Lowenstein e Spomenka Stimec). Come sempre di rilievo la "Serata Internazionale" messa in scena da diversi congressisti, e specialmente quella "Nazionale" dove il fado ha avuto un ruolo importante. Ovviamente non poteva mancare il Banchetto ufficiale, seguito dal Ballo del Congresso. Un paio di novità: all'alba un gruppo di coraggiosi hanno ammirato Lisbona dall'alto, da un pallone aerostatico mentre un altro di volonterosi

congressisti ha affrontato una squadra locale di calciatori veterani rimediando una secca sconfitta per 7 a 1.

74ª INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

De la 4a ĝis la 11a de aŭgusto okazis en Badajoz (Hispanio) la 74a Internacia Junulara Kongreso, en kiu mi partoprenis kiel reprezentanto de BEA – Bunta Esperanto Asocio kaj kadre de la projekto “Florigu Egalecon inter Junuloj” (“Erasmus+” projekto, parte financita de la Eŭropa Unio).

La kongresejo estis universitata loĝejo kiu enhavis en la sama granda konstruaĵo la akceptejon, la salonojn dediĉitajn al la programeroj, la manĝejon, la dormoĉambrojn, trinkejon, naĝejon (multe ŝatitan de la partoprenantoj) kaj ĝardenon (uzitan por koncertoj kaj aliaj eksteraj aktivaĵoj).

La projekto de kiu mi estis membro inkluzivis diversajn aktivaĵojn kaj partojn, okazintajn dum la tuta kongresa semajno; temis pri Pluraneco, Neperforta Komunikado, Genra Perforto, Egalrajtaj Organizoj, Defioj Tutmondaj, Alirebleco.

Krom tiuj, la matena kaj pottagmeza kongresa programo estis riĉa je kursoj kaj eventoj: KER-ekzamenoj, logiko, brazila kapoejro, ŝakoj, dancoj mezepokaj kaj skotaj, lingvokursoj, ktp.

Vespere, interesaj programeroj ĉiam estis: Interkona Vespere, KulturLingva Festivalo en la urbocentro, projekciita filmo, astronomia promenado, klaŭna spektaklo “Utopio”, Internacia Vespere, karaokeo, koncertoj de Martin Wiese, Jonny M, Cyra y Ulisses, Timothy Gallego.

Iu tago estis ankaŭ dediĉita al ekskursoj kaj mi partoprenis tiun “Landliman”: oni vizitis plurajn urbetojn kiuj situas ĉe la limo inter Hispanio kaj Portugalio. Unue Olivenza, tre bela urbo historie portugala sed de du jarcentoj hispana (estis traktato inter la du landoj kiu celis al la redono de la urbo al Portugalio, sed ĝin neniam oni respektis), tagmanĝo kaj bano en grandega portugala lago, poste Monsaraz, Vila Viçosa (vizito al palaco kiu estis loĝejo de Reĝoj de Portugalio), fine Elvas (Monda Heredaĵo de UNESCO). Laŭ mia vidpunkto la kongreso estis bone organizita kaj mi multe

ŝatis ĝin, ankaŭ se ĝi okazis en la varmega regiono Extremadura kun temperaturo preskaŭ ĉiam pli alta ol 40 gradoj.

F. Fagnani

EKUMENA KONGRESO EN PODĚBRADY

De lundo la 6.a ĝis lundo la 13.a de Aŭgusto 2018 okazis la 22-a Ekumena Esperanto-kongreso en Poděbrady (ĉarma baneja urbo 50 km oriente de Prago sur la rivero Elbo). Ĉeestis 76 kristanoj el diversaj konfesioj alvenintaj de 15 diversaj landoj. Ĉeestis ankaŭ 5 italoj inter kiuj nia klubano Giovanni Daminelli. La temo de la kongreso, elĉerpita de Apokalipso estis: *Ni ĉiuj ricevis la saman akvon*. En ĉi tiu okazo, ni memorigis ankaŭ la kvindekan datrevenon de la unua Ekumena-kongreso okazinta en Limberg en 1968. La kongresejo/gastejo estis ĉe la studenta hejmo: *Domov Mládeže Střední Odborné Školy*. Kiel en ĉiuj tiaj kongresoj estis prelegoj, komunaj preĝoj kaj kantoj, ekskursoj, kulturaj eventoj, kaj frataj rilatoj inter ni ĉiuj. La celo estis kontribui al konstruo de la unueco inter la Eklezioj fare de la bazo, aliflanke de la teologiaj pridiskutoj fare de la fakuloj.

G. Daminelli

ESTRARKUNSIDO

La lasta estrarkunsido antaŭ la libertempoj okazis la 5an de julio kaj ĝi ekis per la legado kaj la aprobo de la protokolo de la antaŭa kunsido. Poste oni konstatis ke nun ĉio estas en ordo kaj ĉe la Italaj Poŝtoj kaj ĉe la Kvartala Komunumo pro la ŝanĝo de la prezidanto kaj de sekretario. Tiu ĉi lasta prizorgos la samon ĉe Komunumo kaj Provinco. Kelkaj niaj s-anoj partoprenos en la diversaj kongresoj de tiu ĉi somero kiel verkos raporton. Oni decidis ke dum la jarkunsido de FEI ni proponos la vendon al la membroj kun rabato de iamaj libroj kaj oni petos konfirmon ke la subvencioj el 5X100 estas disponeblaj ne nur al la Grupoj sed ankaŭ al la unuopaj membroj se la iniciato respondas al la rekvizitoj. Pri la venonta agado, oni decidis organizi novan Lingvistikan Laborejon inter septembro kaj oktobro. Oni kontaktos la torinajn s-anojn, kompetentaj kaj tre taŭgaj por krei la konvenan etoson. Oni ankaŭ klopodos informi ĉe

la universitatoj per iaj debato aŭ prelego. D-ro Lamperti interesigis ĉe tiu pri Lingvoj, kunlabore kun prof. Astori, kaj kune kun d-ro Fagnani ĉe la aliaj. La temoj: humanismaj aŭ sciencaj laŭ la medio.

Por favori la kontaktojn kun la eksterlandaj esperantistoj oni petos al d-ro Fagnani aranĝi anoncojn en la Facebook-paĝo de UEA.

Nia s-ano Lamperti informis ke li prelegos aŭguste ĉe la Hispana Kongreso en Madrid, kaj d-ro Daminelli komunikis sian intencon anticipi la varbadon pri la kurso ĉe Liceo Manzoni. Oni decidis ankaŭ enmeti en Bitotekon la "Gramatiko de Vittorio Dall'Acqua", kiun d-ro Daminelli estas preta diĝitigi, kaj ĉiujn numerojn de nia bulteno Informilano jam diĝitigitaj.

E.R.

NIAJ PASINTAJ JAŬDOJ

Nia s-ano Gianni Conti estis la ĉefrolulo de la vespera programo la 12an de julio per sia prelego. Ĉifoje li pritraktis tre eksterordinaran temon kiu interesigis la ĉeestantojn. Pere de la helpo de filmeto tre bone realigita li rakontis la iniciaton de loka juna paŝtisto, Elzeard Bouffier, vivanta en dezerta franca teritorio, flanke de Maraj Alpoj, jam dum la jaro 1913. Tiu paŝtisto iom post iom kaj pacience plantis en la grundon pli malpli centmil kverkajn glanojn. La plejparto, manĝita de aliaj bestoj aŭ pro aliaj kialoj, ne burĝonis aŭ kreskis: tamen almenaŭ kvinmil fariĝis grandaj arboj kiuj kovris tri montetojn kaj ŝanĝis la panoramon kaj la naturan vivon de la loko. Nekredebla okazaĵo, eĉ malfacile sonĝebla. Sed, kiel titolas la prelego, "Sonĝoj tro grandaj ne ekzistas", Tiu ĉi estas la ofte reinsistita aserto de nia preleganto, al kiu laŭfame ne mankas la fantazio kaj sekve la sonĝo. Nia Conti daŭris rakontante aliajn detalojn; inter ili la starigo en urbo Vergons de bela monumento al la paŝtisto danke al kiu surloke reviviĝis poste bela vilaĝo, kaj la kutimo dediĉi kverkojn al famuloj aŭ gravuloj. Por nia preleganto jen ideo sugestenda, iomete ŝerceme, al la FEI por ĝiaj iniciatoj. Li fine konsilis al la ĉeestantoj same kreskigi la kverkojn kaj, por ilin faciligi, sen eki de la glanoj, li donacis al ĉiuj poteton kun kverka planteto, Ankaŭ la fina surprizo!

NOTIZIE DAL MONDO

Parma—Il 18 ottobre l'Università ospiterà al mattino la premiazione del nono Premio di Laurea "Giorgio Canuto" in "Interlinguistica ed Esperantologia". Al pomeriggio un seminario su "Comunicare in una lingua/cultura minoritaria". Per i dettagli consultare www.unipr.it oppure scrivere a davide.astori@unipr.it

Perugia – Domenica 7 ottobre si svolgerà la "Marcia della Pace" da Perugia ad Assisi, che gli esperantisti ben conoscono non solo per aver organizzato partecipazioni ufficiali ma perchè profondamente condividono le sue motivazioni, oggi ancor più attuali. Si spera in una loro significativa presenza. Per aderire: www.perlapace.it

Massa – Il giornale "Il Tirreno" ha pubblicato un articolo sul 26 luglio, Giorno dell'Esperanto, evento festeggiato dall'Archivio di Stato, che ospita la Biblioteca Nazionale di Esperanto con relativo manifesto. Lo stesso giornale, La Nazione e La Gazzetta di Massa hanno pubblicato articoli sulla visita del s-ano Fabricio Valle.

Milano – In previsione del Giorno dell'Esperanto, il 26 luglio, il Circolo Esperantista Milanese ha inviato a numerosi giornali il comunicato stampa formulato dalla FEI per l'occasione,

Su Foghile (Sardegna) – Il s-ano Marino Curnis ha in programma un'altra marcia in autunno; la via Appia Antica a piedi da Roma a Brindisi, 600 km in circa un mese. Partenza prevista: il 15 ottobre.

Roma— "Ruminantia", rivista in rete sul mondo dei ruminanti, dai mercati all'allevamento, dalla produzione casearia alla carne, ecc. è disponibile anche in esperanto su <http://www.ruminantia.it/>

Como –La Giunta Comunale ha deciso di dedicare all'ing. Giordano Azzi, scrittore, poeta ed esperantista, i giardini di via Anzani.

Bologna –All'aeroporto Marconi , 8 volte all'ora per 15 giorni, i 108 pannelli hanno proiettato un manifesto di benvenuto in esperanto per i partecipanti al Congresso Italiano di San Marino.

Rotterdam – I giovani hanno eletto presidente del TEJO Hoan Tran del Vietnam e segretario generale il tedesco Konstanze Schönfeld.